UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

MENDO DE SALONO AŬ BUDO DUM LA 92-a UK (Jokohamo, 4-11 aŭgusto 2007)

Al: Fakaj asocioj kaj organizantoj de fakaj kunvenoj

Artikolo 9 de la Kongresa Regularo de UEA tekstas:

"UK disponigas salonon (proporcian al la grandeco de la koncerna organizaĵo) senpage por unu kunveno al faka asocio aliĝinta al UEA kaj kontraŭ pago por unu kunveno al faka asocio kunlaboranta kun UEA, kondiĉe ke la salono estu petita antaŭ la 15-a de marto de la kongresa jaro. Por pliaj kunvenoj kaj por kunvenoj anoncitaj post la 15-a de marto, oni postulas kompensan pagon por la salono, se ankoraŭ havebla. Salonoj povas, laŭ la eblecoj, esti disponigitaj kontraŭ pli alta pago al aliaj internaciaj movadaj instancoj."

La salonon oni disponigas senpage por maksimuma daŭro de du kunvenhoroj (kunvenhoro estas tempobloko de 45 minutoj), kun eventuala 15-minuta paŭzo inter la du blokoj. Maksimuma grandeco de salono por senpaga mendo: 55 personoj. Por ĉiu ekstra kunvenhoro ankaŭ la aliĝintaj fakaj asocioj pagas oblon de unuhora tarifo.

Ĉi-jare la limdato por salonmendoj estas escepte la **15-a de aprilo**.

La "kompensa pago" (t.e. luo) varias laŭ la salongrandeco. Enestas ankaŭ aparta tarif-kategorio por asocioj neligitaj al UEA. Jen estas la tarifoj por la UK en 2007:

	Prezoj en eŭroj por 1 kunvenhoro (45 minutoj)			
Kapacito, ĝis maksimume:	20 pers.	30 pers.	55 pers.	300 aŭ pli
I – aliĝintaj kaj kunlaborantaj FA	45	55	65	400
II – aliaj	60	80	95	550

Por pli ol unuhoraj kunsidoj la prezo estas oblo de unuhora tarifo por ĉiu horo.

La luprezo inkluzivas unu dratan mikrofonon. Por eventualaj aliaj ekipaĵoj necesas krompagi (vidu la prezojn en la mendilo).

N.B. Frueco de via mendo povas esti decidiga faktoro pri ĝia sukceso!

Se la mendo estos akceptita, UK disponigos la salonon kaj enprogramigos la kunvenon. La mendanto respondecas pri la enhavo de la aranĝo kaj, krome, promesas liveri al la Kongresa Gazetara Servo skriban raporton pri la kunveno maksimume unu horon post ĝia fino.

Organizantoj de fakaj kunvenoj bv. klopodi akordigi la enhavon de la kunvenoj kun la kongresa temo: *"Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto"*.

BUDOJ: Mendo de budo (stando) en la kongresejo kostas 380 eŭrojn por la kongresa semajno (t.e. ekde dimanĉo post la 14h00 ĝis sabato 14h00). Pro spacomanko nepras, ke la mendoj alvenu tre frue, ĉiuokaze antaŭ la **15-a de aprilo**. *Bv. sendi vian mendon per aparta letero, ne sur la dorsflanka mendilo pri faka kunveno!* La mendo devas veni al la Centra Oficejo (adreso supre).

* * *

Ĉu ni sendis tiun ĉi mendilon al la ĝusta adreso? Se ne, bv. ne nur plusendi ĝin, sed ankaŭ avizu nin pri la nova adreso de via asocio. Koran dankon!

MENDILO POR FAKA KUNVENO

Organizaĵo: _____

Rilato kun UEA (bv. kruci unu kategorion):
☐ Aliĝinta Faka Asocio ☐ Kunlaboranta FA ☐ Sen kontrakto kun UEA

Detaloj por publikigo
1. Tipo de kunveno _____
2. Temo de kunveno _____
3. Celo de kunveno _____
4. Respondeculo dum la kongreso _____ KN-ro _____
5. Publiko invitata: ☐ nur membroj ☐ ankaŭ samfakuloj nemembroj ☐ ĉiuj

Daŭro de la kunveno (bv. kruci):
☐ 1 kunvenhoro ☐ 2 kunvenhoroj ☐ 3 kunvenhoroj ☐ 4 kunvenhoroj ☐ 5 kunvenhoroj
La organizantoj rekomendas ke oni faru 15-minutajn paŭzojn post ĉiu kunvenhoro (45') por ebligi transiron al/de aliaj kunvenoj, kiuj samtempe okazas.

Preferata salon-aranĝo (bv. kruci):
☐ teatra (nur sidlokoj) ☐ lerneja (kun skribotabloj) ☐ u-forma aŭ kvadratforma
☐ sentabla kaj senseĝa ☐ alia: _____
(La plenumo de via deziro dependos de efektivaj kaj organizaj ebloj surloke.)

Kapacito de la salono (bv. kruci):
ĝis: ☐ 20 ☐ 30 ☐ 55 ☐ 300 aŭ pli

Bezonataj ekipaĵoj (la luprezo inkluzivas unu dratan mikrofonon):
☐ sendrata mikrofono (€4/h) ☐ video/Powerpoint-projekciilo sen sono (€5/h)
☐ video/PowerPoint-projekciilo kun sono (€15/h) ☐ alia(j) _____

Prefere la kunveno ne koincidu kun jenaj aliaj programeroj de la Kongreso:

_____

☐ Laŭ la Kongresa Regularo nia kunvenejo estas senpaga (nur la aliĝintaj fakaj asocioj).
☐ Bv. debeti la kostojn al nia UEA-konto, kodo: __ __ __ __ – __.
☐ Ni sendas la pagon al la UK per _____. UEA-kodo: __ __ __ __ – __ .

DEKLARO: La mendanta organizaĵo, per la subskribo de sia reprezentanto, rekonas la neŭtralecon de la Universala Kongreso kiel manifestaĵo de UEA kaj promesas fari nenion (ekz. disdoni presaĵojn) en la kongresaj ejoj tiel ke tio povus kompromiti la neŭtralecon aŭ la reputacion de UEA.

Dato _____ Nomo (preslitere) _____
Funkcio _____ Subskribo _____
(Bv. resendi al la CO de UEA antaŭ la 15-a de aprilo!)

POR LA UZO DE LA ADMINISTRACIO
Kotizo pagita por _____ Fakturebla al _____ Konfirmilo _____
Dato _____ Salono _____ Horoj _____

ĈI TIU MENDILO ESTU RESENDITA KUN LA KONCERNA PAGO AL LA CO, ROTTERDAM.